

## *Parabolo*

### *La 3-a Ĉapitro de Saddharma-Pundarika Sutro*

### 法華經譬喻品第三

tradukis **Asano Sanĉi**, Japanio

Tiam Ŝariputro eksaltis, ĝojegis, stariĝis kaj kumpremante siajn manojn suprenrigardis la vizaĝon de la Budho. Li adoris la Budhon kaj diris: “Nun aŭdinte ĉi tiun Darmon mi sentas senekzemplan ĝojegon en mia koro. Kio estas la kialo? Antaŭe mi jam aŭdis tian Darmon de la Budho. Mi treege bedaŭris ke el ĉiuj aŭskultantoj ĉiu bodhisatvo gajnis konsenton de la Budho kaj fariĝis Budho, sed ni ŝravakoj ne povis rilati al tio kaj pro tio ni perdis nekalkuleblajn saĝecojn de Tathagato. Pasante en arbaro aŭ sidante sub arbo mi ĉiam pensis: “Kial la Budho instruis al ni la Darmon de Hinajano, t. e. malgranda veturilo, kvankam ni ankaŭ eniris en la Darmecon<sup>1</sup> same kiel bodhisatvoj?” Sed ni bone komprenas ke ĉi tio devenas de nia eraro kaj ne de eraro de la Budho. Se ni atendus la tempon, kiam la Budho instruos al ni Darmon de Mahajano, ni ankaŭ nepre povus atingi la plej superan plenvekiĝecon. Sed ĉar ni ne povis distingi Darmon de la lerta rimedo, kiu kapablas adaptiĝi al ĉiu cirkonstanco, spite al la lerta rimedo ni erare pensis ke ni jam atingis la plenvekiĝecon. Budho, ĝis nun tio turmentis min tage kaj nokte. Sed finfine mi povis forigi mian tutan dubon pro la nuna senekzempla Darmo de la Budho kaj estas trankvila en koro. Hodiaŭ mi sentas ke mi estas vere Budha-knabo<sup>2</sup>, kiu naskiĝis de la Budha buŝo kaj la instruo de Darmo. Mi ricevas la favoron de Budha Darmo.”

Tiam Ŝariputro diris per versaĵoj por klarigi denove tiun ĉi signifon:

1) Aŭdinte tiun ĉi Darmon mi akiris en la koro grandan ĝojon senekzemplan kaj ĉiuj duboj foriĝis.

2) De la Budho homoj ricevis instruon dum longa tempo kaj ĉiuj neniam perdis la koron de Mahajano. Ho, la voĉo de la Budho influadas tre malofte kaj ĉiam bone formetas turmenton de ĉiuj homoj.

---

<sup>1</sup> eniri en la Darmecon, 法性に入る, akiri veran scion aŭ prave kompreni la leĝon de vakeco, t.e. “Ĉiuj estaĵoj naskiĝas de kaŭzo-rezulto. Tial ĉiuj ne ekzistas originale.”

<sup>2</sup> Budha-knabo, 仏子. Tiu, kiu povas toleri por ricevi la scion de la Budho. Estas tri specoj de la scio, t.e. unue aŭda-scio estas tio, kion oni gajnas aŭdante instruon de la Budho. Due pripensa-scio estas tio, kion oni gajnas pripensi la leĝon de la instruo; Trie seniluzia-scio estas tio, kion oni gajnas per Dhjano, t.e. speciala ekzerciĝo de Budhismo. La knabo, kiu gajnas aŭda-scion, naskiĝas el la buŝo de la Budho. La knabo, kiu gajnas pripensa-scion, naskiĝas el la instruo de la Darmo. La knabo, kiu gajnas seniluziascion, ricevas la favoron de la Budha-Darmo.

3) Mi atingis liberiĝon, kaj plue forigis ĉagrenon.

4) Kiam mi sole loĝadis en la valo de la monto, tiam pasante tra la arbaro aŭ sidante sub la arbo mi kulpigis profunde min, Ho, kial mi trompis min mem?

5) Knaboj de la Budho ni estis kaj eniris en liberiĝon, sed ni ne povos prediki la plej superan belan vojon en estonto.

6) La orkoloro, tridek du<sup>3</sup>, dek povoj kaj liberigoj estis predikitaj en unu<sup>4</sup> Darmo, sed mi ne povis akiri lin.

7) Okdek subtilaj aspektoj, dek ok malkomunaj Darmoj estis predikataj de la Budho, sed mi ne povis akiri.

8) Iam mi estis pasanta sola tra la arbaro. Tiam la famo de la Budho estis plena en la dek direktoj kaj la Budho donacadis la favoron al vivaĵoj. Vidinte ĉi tiun grandiozan aspekton mi pensis mem:

9) 'Mi perdis tiun profiton, ĉar mi longe trompis min mem.' Tage kaj nokte mi pensis pri tio kaj demandis la Budhon.

10) 'Ĉu mi perdis la profiton, ĉu ne?' multfoje pensis. Mi ĉiam vidis la Budhon, kiu laŭdas la bodisatvojn.

11) Ĉiutage mi pripensis pri la aferoj profunde kaj nun mi bone komprenas lertan rimedon de la Budho.

12) Seniluzieca Scio estas tute mireginda. Ĉiuj alvenis amase al predikejo de la Budho. Iam mi estis kaptita de malbona opinioj.

13) Ĉar la Budho sciinte ĉi tion forigis mian malbonon kaj predikis al mi Nirvanon<sup>5</sup>, mi vekigis en Vakeco.

14) Tiam mi pensis, "Mi fine atingis la vekigecon." Sed mi nun rimarkas, ke tio estas malvera vekigecon.

15) Se mi fariĝus Budho, certe tridek du aspektoj aperus sur mia korpo kaj mi estus estimata de ĉieluloj, homoj, jakŝoj kaj nagoj.

16) Tiam mi pensis, "Por eterne mi gajnis seniluziecon." Iam la Budho deklaris, "Mi certe fariĝos la Budho."

17) Aŭdinte tian sonon de Darmo miaj ĉiuj duboj foriĝis.

18) Komence mi surpriziĝis je la instruo de la Budho. "Ĉu ĉi Diablo trompas min sin transforminte Budho?" La Budho lerte predikas per diversaj rilatoj kaj paraboloj konstante. Lia koro estas trankvila kiel la maro. Miaj ĉiuj duboj estis forigita de la instruo.

19) Iufoje la Budho diris: "Multaj estintaj budhoj liberiĝis kaj trankvile predikis ĉi tiun Darmon loĝante en lertaj rimedoj.

20) Estantaj kaj estontaj budhoj estas nekalkuleblaj kaj ili ĉiuj ankaŭ predikas aŭ predikos tiajn Darmojn per lertaj rimedoj."

21) Nuntempe la Budho naskiĝis ankaŭ en ĉi tiu mondo, liberiĝis kaj predikis Darmon ĉiam per lerta rimedo.

---

<sup>3</sup> tridek du, 三十二, tridek du aspektoj de la Budho.

<sup>4</sup> Unu, ĉi tiu montras Darmecon aŭ Vakecon.

<sup>5</sup> brahmanoj, 婆羅門. Tiuj, kiuj ekzerciĝas laŭ brahmanismo. Ŝariputro unue estis instruita de Sanĵaja (instruisto de brahmanismo). Sanĵaja iam komisiis al Ŝariputro, ke li gvidu junajn brahmanojn post forpaso de Sanĵaja.

22) La Budho predikis veran vojon, sed Diablo neniam povas. Tial mi kredas, ke ĉi tiu estas vera Budho, kaj neniam estas Diablo sin transforminta en Budho.

23) Pro dubo unue mi pensis: “Ĉi tiu estas Diablo”. Sed mi nun aŭdas profundan, mildan kaj subtilan voĉon.

24) Per pura Darmono de la Budho mi forigis tutan dubon kaj loĝadas trankvile en tiu ĉi vera scio.

25) Iam mi fariĝos Budho kaj ĉieluloj estimos min. Tiam mi instruos bodisatvojn turnante la plej superan radon de Darmono.

Tiam la Budho diris al Ŝariputro: “Nun mi predikas en la amaso de ĉieluloj, homoj ŝramanoj, brahmanoj<sup>6</sup> k.t.p. Antaŭe mi ĉiam instruadis vin por la plej supera vojo sub dumil miliardoj da budhoj. Ankaŭ vi longe lernadis sub mi. Ĉar mi instruis laŭ lerta rimedo, vi naskiĝis en mia Darmono. Ŝariputro, mi malnova-tempe instigis vin al la vojo de Budho. Vi nun estas forgesinta ĉi tion kaj pensas: “Mi jam liberiĝis per propra povo.” Ĉar mi volas ke vi pripensu pri la vojo, mi predikas ĉi tiun Mahajanana Sutron nomatan “Saddharma-Pundarika” “La Darmono instruanta Bodisatvojn,” kaj “Protektata de multaj budhoj.

Ŝariputro, estonte dum nekalkuleblaj senlimaj kaj mirindaj kalpoj vi regalos mil miliardojn budhojn, subtenos pravan Darmon, havos la vojon, sur kiu ĉiuj bodisatvoj iras, kaj nepre fariĝos Budho nomata Padma-Prabha tathagato, arhato, Plej vekiginto, Sufiĉe Posedanto-de-Scienco-kaj-konduto, Sugato, Mondo-Plejsuperulo, Homdisciplinisto, Instruanto-de-Dio-kaj-Homo, Budho kaj Sinjorego. Via lando estos nomata Viraja. La lando estos ebena, purega, ornamita per diversaj trezoroj, trankvila, riĉega kaj plenplena de ĉieluloj kaj homoj. Jen estas ok krucigataj vojoj sur la tero de laŭzŝtono, kiujn limigos oraj ŝnuroj. Vojflankaj arboj de sep trezoroj estos ĉiam florantaj kaj fruktdonantaj. Padma-Prabha Tathagato ankaŭ instruos disĉiplojn per tri veturiloj. Ŝariputro, kvankam la tempo de Padma Prabho ne estas malbona, Li predikos la Darmon de tri veturiloj, ĉar tio estas Lia originala promeso. La kalpo estos nomata Maharatna-Pratimandito, ĉar en ĉi tiu lando Bodisatvo estas rigardata kiel la plej granda trezoro.

En ĉi tiu lando Bodisatvoj estas nekalkuleblaj, senlimaj kaj mirindaj. Neniu povos kalkuli la nombron kaj eĉ esprimi tion per parabolo. Neniu krom Budha Potenco povos scii tion. Kiam ajn ili ekpaŝus, tiam ĉiam trezoraj floroj subtenus liajn piedojn. Ĉi tiuj Bodisatvoj ne estos ekhavintaj Bodhion unuan fojon. Ĉiuj jam plantadis longe semon de virteco, sinekzercis en puraj brahmanaj servoj<sup>7</sup> sub nekalkuleblaj centmil miliardoj da budhoj, ĉiam lernis scion de Budho kaj akiris grandan okultan povon. Ili plie sciis la pordon de ĉiuj Darmono<sup>8</sup>, estis honestaj, sentrompaj kaj havis fortan volon. En la lando pleniĝos tiaj Bodisatvoj.

---

<sup>6</sup> Nirvano, 涅槃, la celo de tiu, kiu studas la instruon de la Budho. Tio estas la stato de liberiĝo, en kiu ĉiuj pasioj tute estingiĝas. Jen estas du specoj de Nirvano. Nirvano, en kiu oni eniras dum estanta homa vivo. Dua estas Anupaŝesa-Nirvano, t.e. Nirvano, en kiu oni eniras post sia forpaso.

<sup>7</sup> brahmanisma servo. Ĉi tie brahmana ne signifas brahmanisma-dion sed signifas nur “purega”.

<sup>8</sup> pordo de ĉiuj Darmono, 諸の法門. Instruo de la Budho estas la pordo, tra kiu oni povas eniri en la scion de la Budho.

Ŝariputro, la vivdaŭro de Padma-Prabha Budho estos dum dek du malgrandaj kalpoj escepte la periodon de princo. La vivdaŭro de la homoj en la lando estos dum ok malgrandaj kalpoj. Post dek du malgrandaj kalpoj la Padma-Prabha Budho promesis Anuttara-Samjak-Sambodion<sup>9</sup> al la Dhrit-Paripurna Bodisatvo kaj diros al bikŝuoj: “Tiu ĉi Dhrit-Paripurna Bodisatvo fariĝos Budho nomata Padma-Bhavikrani Tathagato, arhato, Samjak-sambudho. La lando de la Budho estos tiela.

Ŝariputro, post la estingiĝo de la Padma-Prabha Prava Darma<sup>10</sup> restos dum tridek du malgrandaj kalpoj kaj Simila Darma<sup>11</sup> restos ankaŭ dum tridek du malgrandaj kalpoj.”

Tiam la Budho denove diris per versaĵoj por klarigi ĉi tiun signifon:

26) Ŝariputro fariĝos la Budho, sanktulo havanta ĉieesta-scion, nomata Padma-Prabha kaj savos nekalkuleblajn vivaĵojn estonte.

27) Regalinte multajn budhojn li elfaros dek fortojn kaj agadojn de Bodisatvo. Li gajnos la plej superan vojon. Post nekalkuleblaj kalpoj la kalpo estos nomata Maha-pratimandita.

28) La lando estos nomata Viraĵa kaj en tiu lando ĉio estos pura kaj senmakula. La tero konsistos el lazuro, kaj oraj ŝnuroj limigos la vojon. Arboj de sep trezoroj ĉiam portos florojn kaj fruktojn.

29) En la lando Bodistvoj ĉiam havos fortan volon kaj sufiĉe akiros la Okultan Paramiton.

30) Ĉi tiuj bone lernados la vojon de Bodhisatvo sub nekalkuleblaj budhoj kaj ĉiuj tiaj Mahasatvoj estos instruitaj tute de la Budho Padma-Prabha.

32) Kiam la Budho estas princo, tiam li forlasos sian landon kaj ĉe sia plej lasta korpo li elfaros la vojon de Budho.

33) Lia vivdaŭro estos dek du malgrandaj kalpoj kaj homoj en la lando vivos dum ok malgrandaj kalpoj.

34) Post la liberiĝo de la Budho la Prava Darma restos dum tridek du malgrandaj kalpoj kaj li savos ĉiujn vivaĵojn.

35) Post kiam la Prava Darma pasis, la Simila Darma restos dum tridek du malgrandaj kalpoj. La ŝariro vaste disvastiĝos kaj estos estimata de ĉieluloj kaj homoj.

36) Agoj de Padma-Prabho estos samaj kiel antaŭe. Li estos plej eminenta kaj egalulo ne ekzistas.

37) Prave vi mem fariĝos tia Budho! Bone, ĝojegu elkore!

Tiam ĉi tie estis amaso da disĉiploj apartenantaj al kvar sekcioj, t.e. bikŝuoj, bikŝuinoj, upasakoj kaj upasakinoj, krome dioj, drakoj, gandarvoj, asuroj, garudoj, kinnaroj, mahorago k.t.p. Ili ĉiuj vidis, ke Ŝariputro estis destinata al Anuttara-Samjak-Sambodhio kaj ĝojegis en siaj koroj kavazaŭ ili dancis. Ili ĉiuj ankaŭ regalis al la Budho per siaj vestoj, kiujn ili vestiĝis ĝis nun. Ŝakro, Brahma-reĝo kaj nekalkuleblaj ĉielknaboj k.t.p. regalis al la

---

<sup>9</sup> Anuttara-Samjak-Sambodio, 阿耨多羅三藐三菩提. Plej supera vera vekiĝeco.

<sup>10</sup> Prava Darma, 正法. Unu el la tri periodoj post forpaso de Ŝakjamunio. Kvincent aŭ mil jaroj post Sakjamunio estas nomataj “Prava Darma”. Dum la tempo ekzistas prava instruo, ekzerciĝo kaj ĝia rezulto.

<sup>11</sup> Simila Darma, 像法. Kvincent aŭ mil cent jaroj post Prava Darma estas nomataj “Simila Darma”. Dum la tempo restis simila instruo kaj ekzerciĝo, sed neniam rezulto.

Budho per belaj vestoj de ĉielo, Mandarako kaj Manamandarakoj de ĉielo. La faligitaj vestoj estis haltantaj kaj turniĝantaj en la aero. Centmil miliardaj specoj da muzikoj estis luditaj de dioj en la ĉielo. La ĉielknaboj faligis ĉielajn florojn kaj diris: "Antaŭe en Baranasi por la unua fojo, la Budho turnis la Radon de Darmo kaj nun ankaŭ ĉi tie turnas superan Radon de Darmo."

Tiam la ĉielknaboj diris per versaĵoj por klarigi ĉi tiun signifon:

38) Antaŭe en Baranasi la Budho turnis la Radon de Darmo, kiu konsistas el la kvar Noblaj Verroj. Li predikis pri apero kaj pereco de kvin skandoj<sup>12</sup>.

39) Nun ankaŭ Li turnas la plej belan kaj superan Radon de Darmo, kiu estas tre profunda kaj estas malfacile kredi ĝin.

40) Ĝis nun ni ofte aŭdis la predikon de la Budho, sed ni neniam ankoraŭ aŭdis tian profundan Darmon. Kiam la Budho predikas ĉi tiun Darmon, tiam ni ĉiuj ĝojas tre multe.

41) Ŝariputro, la granda saĝulo, estis promesata de la Budho. Ni ankaŭ iam fariĝos Budho kaj estos plej alte adorata.

42) Estas tre malfacile pripensi la vojon de Budho. Tial la Budho instruas nin konvene per lerta rimedo.

43) Al la vojo de la Budho ni oferos niajn ĉiujn bonfarojn, kiujn ni faris estinte kaj estante kaj ankaŭ bonfarojn, kiujn ni akiris per nia renkontiĝo al la Budho.

Tiam Ŝariputro diris al la Budho: "Budho, nun mi ne havas eĉ la plej malgrandan dubon. Antaŭ la Budho mi jam gajnis vian antaŭdiron ke estonte mi certe akiros la Anuttara-Samjak-Sambodion. Kiam ĉi tiuj mil ducent disĉiploj, kiuj jam liberiĝis, iam loĝis en la tero de lernado<sup>13</sup>, tiam ĉiam ili instruis dirante ke "Mia Darmo estas la vojo, kiu savas ĉiujn homojn el naskiĝo-maljuneco-malsano-morto kaj fine atingigas al Nirvano." Ĉi tiuj lernantoj aŭ finintoj de la lernado pensis ke ili jam akiris Nirvanon per siaj propraj forlasoj de mem-alligiteco<sup>14</sup> aŭ alligiteco pri ekzisto-ne ekzisto<sup>15</sup>. Tamen antaŭ la Budho ili ĉiuj enfalis en dubon aŭdinte la Darmon, kiun ili neniam antaŭe aŭdis. "Bone Budho, bonvolu prediki la kaŭzon kaj rezulton por disĉiploj apartenataj al kvar sekcioj kaj forlasigu ilin el la dubo."

Tiam la Budho diris al Ŝariputro: "Iam mi diris ke ĉiuj budhoj jam predikis Darmon per lertaj rimedoj t.e. kaŭzo kaj rezulto, parabolo aŭ esprimo por Anuttara-Samjak-Sambodhio, ĉu ne? Ĉi tiuj predikoj estis faritaj por Bodisatvoj. Do, Ŝariputro, mi nun denove klarigas per parabolo ĉi tiun signifon, ĉar saĝulo povas kompreni per parabolo.

---

<sup>12</sup> Kvin skandoj, 五蘊. kvin elementoj, el kiuj ĉiu homo konsistas. a. fizika korpo, formita de kvar elementoj, t.e. solidaĵoj, fluidaĵoj, gasoj kaj energioj. b. sentoj. c. perceptoj. ĉ. inklinoj aŭ ideo. d. konscio.

<sup>13</sup> loĝis en la tero de lernado, 学地に住す. Lernado en Budhismo signifas "forigi ĉiujn pasiojn en sia koro". "tero" estas la loko, kie restas iom da pasioj. Tiu, kiu ankoraŭ ne atingis vekigecon, estas loĝanto en la tero de lernado.

<sup>14</sup> mem-aligiteco, 我執. Esti alligita al la opinio, ke "Mi ekzistas konstante", kvankam homo estas provizore konsistata el kvin skandoj.

<sup>15</sup> alligiteco pri ekzisto-ne ekzisto, 有無の見. La unua opinio estas "Mi neniam estingiĝas". La dua estas "Post morto mi certe iros en neniecon."

Ŝariputro, jen estis granda riĉulo en iu vilaĝo de iu lando. Li pli kaj pli maljuniĝis kaj kadukiĝis. Sed li havis nekalkuleblajn riĉaĵojn, multe da rizejo, multajn domojn kaj servistojn. Lia loĝejo estis tre vasta, sed ĝia pordo estas nur unu. En la loĝejo laŭ cirkonstancoj cent homoj, ducent homoj aŭ kvincent homoj loĝis. Ĉar la domo estis tre malnova, ĉiuj estaĵoj estis putrintaj. Ĉiuj muroj estis detruigintaj, radikoj de ĉiuj kolonoj estis difektiĝintaj kaj ĉiuj traboj kaj firsttraboj estis danĝere kliniĝintaj. Subite fajro havis lokon ĉirkaŭ la domo. Dek, dudek aŭ tridek knaboj de riĉulo estis en la domo. Vidinte tiun ĉi fajron okazintan de kvar flankoj la riĉulo terurige pensas jene: “Nun mi povis liberiĝi sendanĝere el tiu ĉi domo, sed tamen miaj knaboj nek scias nek perceptas nek surpriziĝas nek terurigas tiun ĉi fajron, ĉar ili estas absorbitaj je ĉiuj ludoj en brulanta domo. Kvankam la fajro estas terure proksimiĝanta, miaj knaboj estas nek surpriziĝintaj nek timigitaj. Ŝajnas al mi ke ili tute ne volas forkuri el tiu ĉi terura kaj danĝera stato.”

Sariputro, tiam la riĉulo denove pensis: “Kvankam mi estas maljuna, mi ankoraŭ havas forton en mia korpo kaj ankaŭ ambaŭ manojn. Ĉu mi kapablos eligi miajn knabojn el la domo per florzaj aŭ tabloj?” Li refoje pensis: “Tiu ĉi domo havas nur unu pordon, kiu estas tre mallarĝa. Miaj knaboj ankoraŭ estas infanecaj. Ne sciante la fajron ili estas absorbitaj je ĉiuj ludoj. Baldaŭ ili ĉiuj falos en la fajron kaj brulmortos. Mi devas klarigi pri teruraĵo de fajro al ili. Tiu ĉi domo ja estas brulanta! Tuj eliĝu kaj sin liberigu el la fajro.” Pensante ĉi tion li diris al siaj knaboj, “Tuj eliĝu!” Malgraŭ la averto de sia patro la knaboj tute ne obeis kaj estis ankoraŭ absorbitaj je ĉiuj ludoj. Ili estis nek surprizitaj nek timigitaj de la fajro kaj neniam volis eliĝi el la domo. Ili neniam sciis kio estas la fajro, kia estas la domo kaj kion ili perdas de la fajro. Ili nur vidis sian patron kaj kuris de oriento al okcidento en la fajrdomo.

Tiam la riĉulo pensis, “Tiu ĉi domo jam estas brulanta. Se mi kaj miaj knaboj ne eliĝus el la domo, ni terure brulmortos! Nun mi devas evitigi miajn knabojn el la danĝero per ia lerta rimedo.” La patro konsiderante ke la knaboj certe estos absorbitaj je kuriozaj ludiloj aŭ maloftaj aĵoj, kiujn ili antaŭe ŝatis, diris al ili, “Jen estas la ludiloj, kiujn vi tre ŝatas kaj kiuj estas tre malfacile akireblaj. Se vi nun ne akirus ilin, poste vi nepre pentus. Nun jen estas ĉaroj de ŝafo, de cervo kaj de bovo, kun kiuj vi povos ludi. Vi tuj eliĝu el tiu ĉi domo brulanta. Mi donos al vi tiujn ĉarojn laŭ viaj deziroj.” Tiam aŭdinte la klarigon de sia patro la knaboj dancis pro siaj avidoj por grandaj ŝatataj ludiloj. Interpuŝiĝante reciproke ili rapide eliĝis el la domo brulanta. Tiam la riĉulo vidis ĉiujn knabojn, kiuj eliĝis el domo sendanĝere kaj sidiĝis trankvile kaj ĝojplene sur la strateto de kruĉiĝantaj vojoj. Tiam la knaboj diris al sia patro, “Patro, donu al ni la tri ĉarojn jungitaj de ŝafo, de cervo, kaj de bovo, kiujn antaŭe vi promesis doni al ni.”

Ŝariputro, tiam la riĉulo donis al ĉiuj siaj filoj samajn grandajn ĉarojn, kiuj estas altaj, vastaj kaj ornamitaj de diversaj trezoroj. Ĉiuj ĉaroj estis ĉirkaŭitaj de balustradoj kaj multaj tintiloj estis pendigitaj kvarflanke. Super ĉiuj ĉaroj grandaj ombreloj ornamitaj de maloftaj trezoroj estis provizitaj. Malsupre de la ombrelo trezoraj ŝnuroj, al kiuj multaj floraj diademoj estis alligitaj, kruĉiĝis reciproke. En ĉiuj ĉaroj oni sternis litksenojn kaj surmetis ruĝajn kapkusenojn. Blanka bovo, kies haŭto brilas vivoplene kaj kies aspekto estas tre bona, estis preparita por treni la ĉaron post si. Ŝi havis grandan forton de muskolo kaj povas kuri rapide kiel vento. La bovo povis paŝi egale je ĉiu paŝo. Multaj servistoj gardis ĉiujn ĉarojn.

Tiu ĉi granda riĉulo havas nekalkuleblajn riĉaĵojn kaj liaj ĉiuj trezorejoj estis plenigitaj. Do, li pensis: “Miaj riĉaĵoj estas senmezuraj. Mi ne devas doni al miaj filoj malbonan, malgrandan ĉaron. Nu, ĉi ĉiuj knaboj estas miaj propraj. Mi amas ilin egale. Mi havas tiajn grandajn septrezorajn ĉarojn, kies nombro estas ne kalkulebla. Mi devas doni saman ĉaron al ĉiu filo kun egala koro. Mi ne devas diferencigi ilin, ĉar eĉ se mi donus miajn havaĵojn al ĉiuj homoj en mia lando, nenio mankus al mi, Al miaj filoj des pli prave!” Tiam liaj ĉiuj knaboj prenis grandajn ĉarojn kaj ĝojegis tiel senekzemple ke nenio alia estus kompare kun tio. Ĝariputro, kiel vi pensas pri tio? Ĉu tio, ke la riĉulo donis egale al ĉiuj knaboj la grandajn ĉarojn kun blanka bovo, estas falsa?”

Ĝariputro respondis, “Ne Budho, eĉ se la riĉulo nur evitigis siajn filojn el la fajro kaj savis ilin el morto, li ne eraris, mi pensas. Se la knaboj povus eviti la gravan danĝeron, tio meritus je donado de ludilo. Tio estas des pli prave, ke li savis siajn filojn el la fajro. Budho, eĉ se la riĉulo ne donus al siaj filoj la plej malgrandan ĉaron, li ne falsus. Kio estas la kialo? Tiu ĉi riĉulo pensis antaŭe, ‘Mi volas eligi miajn filojn el la fajro per iu lerta rimedo.’ Pro tio li ne eraris. Estas des pli prave, ke la riĉulo donis egale al ili grandajn ĉarojn por ĝojigi ilin sciinte ke li havas nekalkuleblajn riĉaĵojn.”

La Budho diris al Ĝariputro.

“Bone, bone, via diro estas vera. Ĝariputro, Tathagato<sup>16</sup> estas tia. Li fariĝis la patro de ĉiuj vivaĵoj. Li tute konkeris siajn timecon, malprosperon, malĝojon, mallumon kaj dubon. Do, Li kompletigis nekalkuleblajn sciojn, forton kaj netimecon. Li havas grandan potencon kaj sciforton. Li havas ankaŭ lerta-rimeda-paramiton kaj scio-paramiton. Li estas havanto de granda amo kaj granda kompatato. Tathagato neniam laciĝas kaj ĉiam dezirante bonagon donacas profiton al ĉiuj homoj. Nu, Li aperis en tiu ĉi malnova, putriĝinta kaj brulanta domo, t.e. tri mondoj, por savi ĉiujn vivaĵojn el la fajro de naskiĝo, maljuneco, malsano, morto, malĝojo, lamento, sufero, ĉagreno, malsaĝo, dubo kaj tri venenoj<sup>17</sup> kaj por instrui ilin kiel ili povos atingi al Anuttara-Samjaka-Sambodio. Ĉiuj vivaĵoj estas bruligataj de la fajro de naskiĝo, maljuneco, malsano, morto, malĝojo, lamento, sufero kaj ĉagreno kaj ankaŭ suferadas pro kvin avarecoj por riĉaĵoj kaj profitoj. Ili ne nur suferadas estante pro sia persekuto de avareco, sed estonte falos en inferon, malsatan demonon aŭ beston. Eĉ se ili naskiĝus en ĉielmondo aŭ la mondo de homo, ili ricevus diversajn suferojn, t.e. sufero pro malriĉeco, sufero pro disiĝo de amato kaj sufero pro loĝado kun malamato. Ĉiuj homoj vivas, ĝojas kaj ludas en tiaj malŝataj mondoj ne perceptante, ne sciante, ne estante surprizitaj kaj ne timante tiajn danĝerojn. Ili ankaŭ ne malamas tiun ĉi suferplenan mondon kaj ne deziras liberiĝon el iluzio. Kvankam ili renkontas grandan suferon, ili eĉ ne malĝojas pri tio kurante de okcidento al oriento.

Ĝariputro, tathagato vidinte ĉi tion pensis, ‘Mi estas patro de ĉiuj vivaĵoj. Mi volegas savi tiujn ĉi vivaĵojn, doni al ili Budha-scion kaj lumigi ilin.’ Ĝariputro, Tathagato ankaŭ pensis, ‘Se uzante neniun lertan rimedon mi laŭdus nur Budha-scion, forton kaj sentimecon per miaj potenco kaj sciforto, ĉiuj homoj ne povus liberiĝi el la mondo. Ĉi tiuj vivaĵoj ankoraŭ ne eliĝas el la naskiĝo, maljuneco, malsano, morto, malĝojo, lamento,

---

<sup>16</sup> Tathagato, 如来. unu el la dek honoraj titoloj de Budho. Tiu ĉi signifas “Tiu, kiu alvenas el la vera lando (Tatha).

<sup>17</sup> tri venenoj, 三毒. tri grandaj pasioj, kiujn havas ĉiu homo, t.e. avareco, kolero kaj senscio.

sufero kaj ĉagreno kaj evidente estas brulataj de trimonda fajro. Per kio ili povas akiri Budah-Scion?’

Ŝariputro, kvankam la riĉulo havas forton en sia korpo kaj manoj, li ne uzis sian forton. Li povis savi siajn filojn el la brulanta domo per iu bonkoreca gvidado kaj fine li donis al ili maloftajn grandajn ĉarojn. Tathagato agas tiel same, kiel la riĉulo agis. Eĉ se Li havas potencon kaj sentimecon, Li ne uzis tiujn ĉi. Per lerta rimedo kaj scio Li predikis tri veturilojn, t.e. veturiloj de ŝravako, pratiekabudho kaj Budho, por savi ĉiujn vivaĵojn el brulanta domo de tri mondoj. Li eĉ diris, ‘Ne volu esti en la brulanta domo de tri mondoj. Ne avidu maldelikatajn materion, voĉon, odoron, guston kaj objekton de palpo. Se vi amegus iun el ili pro pasio, vi estus bruligota de pasiofajro. Vi devas klopodi por eliĝi baldaŭ el tiuj ĉi tri mondoj kaj teni tri veturilojn, t. e. veturiloj de ŝravako, pratiekabudho kaj Budho. Nun mi garantias tiun ĉi instruon por vi. Ĝi neniam estos vana ĝis fino. Vi klopodu kaj marŝu antaŭen!’

Tathagato gvidas ĉiujn vivaĵojn per ĉi tiu lerta rimedo. Li ankaŭ diris, ‘Nu, vi sci! Ĉiuj antikvaj sanktuloj laŭdis tiun ĉi Darmon de tri veturiloj, kiu estas libera, malligita kaj sendependeca. Se vi tenus tiujn ĉi tri veturilojn, vi povus eniri en grandan ĝojegon de vekigintaj sento, forto, kompreno kaj vojo, plie meditado, liberiĝo kaj samadio kaj fine akiri nekalkuleblajn trankvilecojn kaj komfortojn.’ Ŝariputro, jen estas iu estaĵo, kiu havas en sia koro saĝecon, deziregas eliri el tri mondoj kaj penas kun ĝentileco al Nirvano. Ĉi tio estas nomata veturilo de ŝravako. Ĉi tio estas simile al tio ke la knaboj eliris el la fajrdomo dezirante veturilon de ŝafo. Ankaŭ estas iu estaĵo, kiu kredas la Darmon predikatan de la Budho, penas kun ĝentileco, deziras scion pri naturo, amegas silentan trankvilecon en solula vivo kaj scias profunde kaŭzon kaj rezulton de ĉiuj fenomenoj. Ĉi tio estas nomata veturilo de pratiekabudho. Ĉi tio estas simile al tio ke tiuj knaboj eliras el la fajrdomo dezirante veturilon de cervo. Fine estas iu estaĵo, kiu kredas la Darmon predikatan de la Budho, klopodas al Bodhio, deziras scion pri ĉio, Budha-scion, esenca-scion<sup>18</sup>, seninstruistacion, Tathagatajn scion, forton kaj sentimecon kompatante trankviligas nekalkuleblajn estaĵojn, donacas profitojn al homoj kaj ĉieluloj kaj liberigas ĉiujn estaĵojn. Ĉi tio estas nomata granda veturilo. Tiu, kiu tenas ĉi tiun veturilon estas Bodhisatvo kaj nomata Mahasatvo. Ĉi tio estas simile al tio ke knaboj eliras el la fajrdomo dezirante veturilon de bovo. Ŝariputro, kiam la riĉulo vidis siajn knabojn jam elirintajn el la fajrdomo kaj starantajn ĉe sendanĝera loko, tiam pensinte siajn proprajn nekalkuleblajn havaĵojn li donis egale al ili grandajn veturilojn. Tiel agis ankaŭ Tathagato, ĉar Li estas patro de ĉiuj estaĵoj. Iam Li vidis tion ke per la pordego de Budha-instruo nekalkuleblaj centmilionaj estaĵoj elirinte el sufera, timega kaj kruta vojo de la tri mondoj akiris la ĝojegon de Nirvano, tiam Li pensas, ‘Mi havas konservejon de nekalkuleblaj scio, forto kaj sentimeco. Ĉi ĉiuj estaĵoj estas miaj gefiloj. Mi volas doni al ili egale grandan veturilon. Mi ne volas liberigi ilin sole. Mi volas liberigi ĉiujn estaĵojn per la libriĝo de Tathagato.’ Al tiu, kiu jam eliris el la tri mondoj, Tathagato donacos diversajn ilojn de plezuro, t.e. meditado, eterna emancipo k.t.p. Ĉi tiuj aĵoj estas unuformaj kaj unu specaj<sup>19</sup> kaj laŭdataj de Sanktuloj. Ili certe ĝuos la plej altan komforton puran kaj dolĉan. Ŝariputro, la riĉulo unue gvidis siajn

---

<sup>18</sup> esenca scio, la scio rilate al la leĝo de dekdu kaŭzo-rezulto, 十二因緣.

<sup>19</sup> unu formo kaj unu speco, 一相一種. Unu formo signifas ke ne ekzistas formo. Unu speco signifas, ke distingo ne ekzistas inter tri veturiloj.



knabojn per tri veturiloj kaj poste donis nur grandan veturilon, kiu estis ornamita de trezoroj, sed li estis senkulpa. Ankaŭ Tathagato unue gvidas ĉiujn estaĵojn predikante tri veturilojn kaj poste liberigas ilin per granda veturilo. Sed Li estas senkulpa. Kio estas la kialo? Tathagato povas doni al ĉiuj estaĵoj la Darmon de granda veturilo, ĉar Li posedas nekalkuleblajn scion, forton, sentimecon kaj trezorejon de ĉiu Darmo. Sed ĉiuj estaĵoj ne povis kompreni la Darmon. Do, Ŝariputro, vi komprenu, ke iam ĉiuj budhoj predikis tri veturilojn en unu Budha-veturilo, ĉar ili havis forton de lerta rimedo.”

Tiam la Budho denove predikis per versaĵoj por klarigi tiun ĉi signifon:

44) Ekzemple, jen estas riĉulo havanta domon malnovan, kiu estas tre alta, danĝera kaj detruiganta. Bazoj de ĉiuj kolonoj estas putrintaj, rompiĝintaj.

45) Traboj kaj firstoj kliniĝas, la ŝtuparo disŝiriĝas. Bariloj kaj muroj rompiĝas tra la tuta surfaco kaj multe da ŝlimo estas ĉia loke disĵetita.

46) Kovrantaj tegmentoj estas malordiĝantaj kaj falantaj. Ĉevronoj kaj tegmentrandoj deflankiĝas kaj defalas.

47) Bariloj, kiuj ĉirkaŭas la domon, tre fleksiĝas. Multaj malpuraĵoj estis plenplenaj en la domego. Kvincent homoj loĝas en la domo.

48) 49) Milvoj, strigoj, spizaetoj, agloj, korvoj kaj pigoj, kolomboj, domaj kolomboj, lacertoj, serpentoj kaj plie venenaj serpentoj, skolopendroj, skorpioj, meloj, gekoj, musoj, ratoj, lutreoloj, niktireŭtoj kaj malbonaj malbelaj larvoj ĉiam kuradas kaj rampas en la tereno de la domo.

50) Malbonodoraj fekaĵoj kaj urino estas plenplenaj. Multaj larvoj kolektiĝas. Vulpoj, lupoj kaj hundaĉoj, ĉiuj bestoj dismordas forĵetitajn kadavrojn.

51) Ĉie estas ostoj kaj karnoj. Baldaŭ hundoj alvenas, bojas kontraŭ alia, malsatinte kaj laĉiĝinte ili serĉadas manĝaĵojn ĉiam ĉie kaj ĉi tie.

52) Ili estas kontraŭstarantaj, mordantaj unu la alian kaj furioze muĝantaj, la domo estas tiel terura.

53) Monta kaj akva demonoj, arba kaj ŝtona aperoj, jakŝoj kaj malbonaj ogroj; ili manĝas homajn karnojn.

54) Malbonaj birdoj kaj bestoj kreskiĝas siajn infanojn, jakŝoj alvenas obstine kaj manĝas kovratojn.

55) Manĝinte kaj satiĝinte ili bruas furioze kaj intense malpaciĝas kun kruela malbeno.

56) Kumbhandoj kaŭras sur la tero, irante super la tero je unu aŭ du ŝakuloj ili amuziis arbitre.

57) Tenante la ambaŭ piedojn de la hundo kaj batante ili perdigas ĝian voĉon, kuniĝinte ĝian kolon al ĝiaj kvar piedoj ili surprizas la hundon.

58) Ogroj loĝas en la domo, li estas ĉiam senvesta. Li estas longa kaj granda, lia korpo estas nigra kaj malgrasa.

59) Kun tre malagraba voĉo li krias kaj serĉas manĝaĵojn. Jen estas alia ogro, kiu havas maldikan gorĝon, simile al akra pinglo.

60) Jen estas alia ogro, kies kapo estas granda kvazaŭ la kapo de bovo. Li manĝas homan karnon aŭ hundon aliloke.

61) La kapharoj malordiĝas, li estas tre furioza. Pro malsato kaj soifo li krias kaj ĉirkaŭkuras.

62) Jakŝo, malsata demono, malagrablaj birdo kaj besto iradas al kvar direktoj, kaŝe rigardas la fenestron.

63) Tiaj malfacilaĵoj kaj teruraĵoj diversaj, ho, estis nekalkuleblaj en la domo de la riĉulo.

64) Tiu ĉi malnoviĝinta kaj putrinta domo estis longe posedata de unu homo riĉega. Post nelonge de la tempo, kiam li eliris, terura brulego subite okazis en lia domo.

65) El kvar direktoj samtempe fajro brulis intense. Firsto, trabo, ĉevrono kaj kolono eksplodbruas, tremas kaj dissiriĝas, disrompiĝas kaj falas.

66) Barilo kaj muro detruigĝas, ĉiuj demonoj laŭte krias. Spizaetoj kaj agloj, kumbando konfuziĝas, teruriĝas kaj ne povas eliri el la domo.

67) La furiozaj bestoj kaj multe da venenaj vermoj forkuras kaj kasiĝas en la kavo profunde, piŝaĉoj ankaŭ eniras en tiu kavo rapide.

68) Ĉar ili mankas al profito, ili vundas reciproke kaj estas minacataj ĉiam de la fajrego, trinkas sangon de aliulo, manĝas karnon de aliulo.

69) Vulpoj, iliaj specaj bestoj ĉiuj jam mortis antaŭe. Grandaj malagrablaj bestoj alvenis kaj manĝas la kadavrojn.

70) Malbonodoro kovras ĉirkaŭen kaj pleniĝas kvardirekte. Skolopendro, Skorpio kaj venena serpento bruante kaj kurante rapide eliras el la kavo.

71) Kumbando kaptas kaj formanĝis ilin. Nenio restas. Ankaŭ malsataj demonoj, kies kapoj brulegas, malsatas, soifas kaj kuras kun ĉagreno konfuziĝante.

72) La domo estas terura pro veneno kaj fajro. Ĉiuj malfacilaĵoj ja estas samtempe okazintaj.

73) 74) Tiam posedanto de la domo staris ekster la domo kaj aŭdis ke oni diras, "Antaŭ nelonge viaj knaboj eniris tiun ĉi domon kaj sin fordonas al ludo, ĉar ili estas ankoraŭ infancaj kaj malsaĝaj." Aŭdinte ĉi tiun la riĉulo surpuriziĝis kaj eniris en la fajrdomon por savi siajn amatajn knabojn el ĉiuj teruraj fajroj kaj okazintaj obstrukcoj.

75) Sciiĝinte malfacilojn li konsilis siajn knabojn. "Malbonaj demonoj, vermoj venenaj kaj fajrego estas nun en tiu domo etendiĝanta malfeliĉe.

76) 77) Multaj suferoj atakas vin unu post alia. Venenaj serpento, lacertoj, Jakŝoj, kumbandoj, spizaetoj, agloj, milvoj, skolopendroj, pigoj estas tre furiozaj. Ĉiuj estas minacataj de malsatego kaj soifo. Eĉ nur toleri la suferon vere estas malfacile. Multe pli netorelebla estas la sufero pri la granda fajro."

78) Spite al averto de la patro, ĉar la knaboj ne komprenas la danĝeron de brulego, ili ankoraŭ absorbiĝas al la bagatela ludo en la brulanta domo.

79) Tiam la riĉulo pensis maltrankvile en sia koro, "Nun mi estas malĝojega pro miaj malfeliĉaj knaboj. En tiu ĉi domo estas nenio plezura.

80) Sed tamen miaj knaboj absorbiĝante en ludo neniam eĉ ete akceptis mian urĝegan averton. Ili estas tuj bruligota de la terura fajrego."

81) Li pripensis kaj diris al ili per sia lerta rimedo. "Mi posedas veturilojn el belega trezoro, en kiuj estas multe da diversaj ludiloj maloftaj.

82) Tiuj estas veturiloj de ŝafo, cervo kaj bovo. Ĉi tiuj atendas vin antaŭ la pordo, tuj eliru!

83) Ja, mi aranĝis tiujn ĉi veturilojn por vi ĉiuj. Laŭvole ludu per tiuj ĉi belaj ĉarmaj veturiloj."

84) Ĉe tio la knaboj eliris el la brulanta domo. Konkurante kaj kurante ili forigis suferojn.

85) Vidinte tion ke la knaboj eliris el la fajrdomo kaj ripozas trankvile sur la kvarangulo de vojo, la riĉulo sidiĝas sur la leona sidejo.

86) Tiam li ĝojplene diris, "Mi nun estas tre feliĉa. Malfacile estas fakte instrui ĉi tiujn knabojn, kiuj eniris en la domon danĝeran pro malsaĝeco.

87) Jen estas venenaj vermoj kaj teruraj spiritoj. Grandaj fajregoj okazas samtempe el kvar flankoj.

88) Sed tamen tiuj ĉi knaboj alteniĝis al ludado. Mi savis ilin el la danĝero, evitigis la katastrofon.

89) 90) Tial mi estas feliĉa." La knaboj vidinte la patron iris antaŭ lin kaj diris, "Bonvolu tuj doni al ni tri trezorajn veturilojn, pri kiuj vi parolis 'Se vi eliras el la domo, mi donos tri veturilojn.' Ja, nun estas ĝusta tempo, donu al ni la donacon."

91) La riĉulo estas tre riĉa, lia trezorejo estas plena de oro, arĝento, tridakno, lazurŝtono kaj agato.

92) Veturilo estas farita de diversaj trezoroj kaj ĉirkaŭataj de balustradoj. Multaj tintiloj estas pendigataj kvarflanke. Oraj ŝnuroj kruciĝas.

93) Perlaĵ retoj etendiĝas sur la belaj veturiloj. Diademoj de oraj gloroj pendas tie kaj ĉi tie.

94) La litkuseno estas farita el mola silko. Tapiŝoj estas helaj, puraj, blankaj, noblaj kaj multekostaj.

95) Kun la veturilo estas granda kaj tre blanka bovo. Ĝi estas ankaŭ dikkorpa, brava, forta kaj belega.

96) Multaj servistoj gardas la grandiozan veturilon. La riĉulo donas la veturilon same al ĉiuj knaboj. Tiam ili ĝojegante, dancante iradas ĉie kaj ludadas, plezuras libere kaj senbare.

97) Ŝariputro, vi aŭskultu! Mi estas sama kiel la riĉulo. Mi estas patro de la mondo kaj unua el sanktuloj.

98) Kvankam ĉiuj estaĵoj prave estas miaj filoj, ili alteniĝas profunde al plezuro de la mondo kaj ne havas saĝecon.

99) En la mondo ne ekzistas trankvileco, konstanteco. Homoj ĉiam tremas pro timo, kvazaŭ ĉiuj loĝus en fajrdomo. Multaj suferoj estas plenaj, homa vivo estas terura.

100) Ĉiam ĝi estas plenigita de malĝojo el naskiĝo, kaduko, malsano kaj morto. Tiaj fajroj estas brulantaj senĉese eĉ momenton.

101) Jam Tathagato liberiĝas el fajrdomo en la mondo kaj Li loĝas tre trankvile en la arbaro aŭ kampo.

102) Nu, la mondo estas mia, la vivajoj estas miaj filoj. Nun ĉi tie fakte estas malfacilaĵoj multaj. Nur mi povas savi ĉiujn suferantojn en la mondo.

103) Kvankam mi instruadas, ĉiuj ne ricevas tion. Ili profunde alteniĝas al plezuro de la mondo.

104) Tial laŭ lerta rimedo mi predikas ĉi tiun Darmon de tri veturiloj, per kiuj ĉiuj scias suferojn de la mondo kaj vojon transiri la mondon.

105) Se iu decidas firme rifuĝi en la Budho, li kompletigas tri lumojn<sup>20</sup>, ankaŭ ses okultajn povojn<sup>21</sup>, gajnas pratiekabudhon<sup>22</sup>, senretiriĝan Bodhisatvon<sup>23</sup>.

106) Ŝariputro, aŭskultu! Mi hodiaŭ predikas Unu Budha-veturilon uzante la parabolon por ĉiuj mizeraj estaĵoj.

107) Se vi ĉiuj akceptus tiun ĉi Budhan instruon, vi ĉiuj povus kompletigi la veran vojon de la Budho.

108) Ĉar tiu ĉi veturilo estas bonega kaj unua el la puraĵoj, nenio estas super ĉi veturilo.

109) Tiu ĉi estas la veturilo, kiun la Budho promesis doni, kaj ĉiuj devas laŭdi, regali kaj adoradi.

110) Jen estas nekalkuleblaj centmil fortoj, liberiĝoj, djanoj, saĝecoj kaj ankaŭ aliaj Darmoj de la Budho.

111) Al ĉiuj miaj filoj haviginte la veturilon tage kaj nokte dum kalpoj mi lasis ilin ludadi.

112) Mi baldaŭ venigis al la Seminario Bodhisatvojn kaj ŝravakojn per la trezora veturilo.

113) Pro la kaŭzo kaj rezulto eĉ se oni serĉus atente en dek direktoj, troviĝas nenio escepte de la gvidada veturilo de la Budho.

114) Ŝariputro, vi aŭskultu! Mi anoncas al vi tion, ke vi kaj ĉiuj homoj estas miaj gefiloj. Do, mi estas via patro.

115) Vi estis bruligitaj ĉiam de multaj suferoj ekde multaj estintaj kalpoj. Sed nun mi eligis vin ĉiujn el la tri mondoj.

116) Antaŭe mi parolis "Vi ĉiuj enlumiĝos." Sed vi forigis nur naskiĝ-morton, neniam liberiĝis. Nun vi devas akiri la scion de la Budho.

117) Se jen estus la bodhisatvo en la amaso da homoj, Li devas aŭdi la veran Darmon de budhoj tutkore.

118) Kvankam ĉiuj budhoj parolas laŭ sia lerta rimedo, vivaĵoj instruataj ĉiuj estas Bodhisatvoj.

119) Jen estas malsaĝulo, kiu alteniĝas al pasio; por li la Budho predikis eĉ la scion pri sufero.

120) Ĉiuj estaĵoj ĝojegis kaj dancis senekzemple. La scio de la sufero, kiun la Budho predikis, estas efektive vera kaj senerara eterne.

121) Jen estas homo, kiu ne scias la kaŭzon de sufero kaj profunde alteniĝas al la kaŭzo de sufero. Li ne povas eĉ momente eliĝi el la sufero. Tial la Budho predikis la vojon per lerta rimedo.

---

<sup>20</sup> Tri lumoj, 三明. tri pli superaj okultoj: la unua estas la povo, per kiu oni povas scii sian aŭ alian estontecon; la dua estas la povo, per kiu oni povas scii sian aŭ alian vivadon en estonto; la tria estas la povo, per kiu oni povas scii profunde sian suferon en estonto kaj forigi siajn pasiojn.

<sup>21</sup> ses okultaj povoj, 六神通. El la ses povoj tri respondas al tri lumoj (vidu noto 20). Aliaj tri estas sekvantaj: la unua estas la povo (superaj piedoj), per kiu oni povas aernavigi senbare; la dua estas la povo (ĉiel-oreloj), per kiu oni povas aŭdi ĉiujn voĉojn proksime aŭ malproksime; la tria estas la povo, per kiu oni povas scii libere ĉiujn pensojn en alia koro.

<sup>22</sup> Pratieka-budho, 辟支仏. Tiu, kiu memvekiĝis vidinte naturan fenomenon en la mondo.

<sup>23</sup> Senretiriĝa bodhisatvo, 不退の菩薩. Bodhisatvo, kiu neniam malaltiĝas.

122) Ĉar la kaŭzo de la sufero estas avareco mem; se la avareco estingiĝus, sufero perdus sian bazon.

123) Estingiĝo de la sufero estas nomata la tria scio<sup>24</sup>. Por la scio de estingiĝo oni sin ekzercas laŭ la vojo.

124) Se oni malkuniĝus el ĉirkaŭligo de suferoj, tio estas liberiĝo. Per kio homo povus liberiĝi?

125) Tiu, kiu foriĝas nur el la malvereco, ankoraŭ ne liberiĝas el ĉio efektive.

126) La Budho iam diris ke la homo ne liberiĝas, ĉar li ne ankoraŭ gajnas la plej superan vojon.

127) Mi neniam pensas ankaŭ en mia koro ĉi tion, ke mi povis lin liberigi.

128) Mi estas Reĝo de Darmo kaj tute libera en Darmo. Mi aperis en tiu ĉi mondo por feliĉigi estajojn.

129) Ŝariputro! Mi predikas ĉi tiun Darmon por favori sur ĉiuj vivaĵoj. Vi ne propagandu ĝin sencele, kie ajn vi iras.

130) Jen estas homo, kiu aŭdas kaj tenas ĉi tiun Darmon firme en sia koro kaj ĉiam adoras ĝin. Ja tiu ĉi homo estas senretiriĝa ulo.

131) Se estas homo, kiu kredas tiun ĉi Darmon, li jam vidis, adoris multajn budhojn kaj ankaŭ longe aŭdadis la Darmon de multaj budhoj.

132) Se estas homo, kiu kredas Darmon predikitan de vi, li vere estas homo, kiu jam renkontis min kaj iam ankaŭ vidis vin kaj bikŝuojn kun bodhisatvoj.

133) Mi predikas tiun ĉi Saddharma-Pundarikon nur al tiuj, kiuj havas profundan sciogon. Eĉ se sen-sciuloj aŭdus, li neniam povus kompreni ĉi tion.

134) Ĉiuj ŝravakoj ne havas povon kompreni la sutron. Ankaŭ pratieka-budhoj ne havas povon kompreni ĝin. Ho ve, vi Ŝariputro! Vi povis kompreni la sutron pro profunda kredo, des pli aliaj ŝravakoj.

135) Aliaj ŝravakoj ankaŭ obeas al tiu ĉi sutro pro sia firma kredo al la parolo de la Budho. Ili neniam obeas pro sia propra scio.

136) Ŝariputro! Ne prediku tiun ĉi sutron al la homoj arogantaj, maldiligentaj kaj forte obstinaj.

137) Jen estas homoj ordinaraj, kiuj estas sensciaj kaj profunde absorbitaj al aĵoj de kvin avarecoj. Eĉ se ili aŭdus la sutron, ili ne povas kompreni. Tial vi neniam prediku al tiaj senpripensaj uloj.

138) Se iuj ne kredus la sutron kaj plie riproĉus ĝin, ĉiuj aliaj grimacus al la Darmo aŭ dubus ĝin. Nepre ili pereigus ĉiujn semojn de budho<sup>25</sup>.

139) Vi aŭskultu! Mi, la Budho, nun parolas pri la puno.

140) Se iu riproĉus la sutron aŭ en vivado de la Budho aŭ ankaŭ post Lia morto, kaj se iu vidante ĉi tiun, kiu legas sutron aŭ kopias ĝin, malestimus, malŝatus kaj sentus malamon kontraŭ li, vi aŭskultu, tiu ĉi homo enfalus en Avici<sup>26</sup> post sia morto.

---

<sup>24</sup> Tria scio, 第三の諦. la tria el la kvar scioj, t.e. (a) scio pri la sufero, (b) scio pri la amasiĝo de sufero, (c) scio pri la estingiĝo de sufero, (ĉ) scio pri la vojo por forigi suferon. Sekve la tria scio estas la stato, en kiu ĉiuj pasioj tute estingiĝis, t.e. Nirvano.

<sup>25</sup> Semo de Budho, 仏種. Semo, el kiu Budho naskiĝas, t.e. Budheco.

<sup>26</sup> Avici, 阿鼻. Unu el la inferoj, la plej malsupera kaj tre malluma.

141) Post unu tuta kalpo li renaskiĝos multfoje. Elirinte el la infero eniros en bestmondon.

142) Se tiam li renaskiĝus kiel hundo aŭ vulpo, koloro de la haŭto estos malhele brua aŭ nigra. Sur la haŭto etendiĝos makulo de la lepro.

143) Li estos malestimata, malŝatata, serĉmokata. Plue li ĉiam suferos pro malsato kaj sojfo.

144) Vivante li ricevos suferon de veneno. Post lia morto homoj ĵetos al li tegolon aŭ ŝtonon. Pro sia estinta kulpo li ricevos tian punon.

145) 146) Li iam fariĝos kamelo aŭ naskiĝos kiel azeno, kaj li ĉiam devos porti pezan ŝarĝon sur sia dorso, aŭ estos batata de vipo. Serĉante nur akvon kaj herbon, nenion li deziras. Pro sia riproco de la sutro li estos tiel punigata.

147) 148) Se iu punigito renaskiĝos kiel vulpo, lia haŭto havos makulon de skabio aŭ lepro. Kiam ĝi venos al vilaĝo, tiam ĝi perdos unu okulon kaj nepre estos batata de multaj kruelaj knaboj, ricevos multajn suferojn kaj fine estos mortigita.

149) 150) Post morto li denove ricevos korpon de serpento, kiu estas longa kaj granda je kvincent juĝanoj. Li estos surda, malsaĝa kaj antaŭeniras rulante. Li movos sin per sia ventro, ĉar li estas senpieda. Li estos mordata de vermoj kaj ĉiam ricevos suferon. Pro sia riproĉo de la sutro li estos tiel punigata.

151) Eĉ se li renaskiĝus denove kiel homo, liaj ĉiuj sentorganoj estas tre malrapidaj. Li estos malalta, malbela, lama, senkrura kaj ĝiba.

152) Kiam ajn li parolas, neniu fidas liajn vortojn. Interno de lia buŝo ĉiam estos malbonodora. Li estos posedata de demono aŭ fantomo. Ankaŭ li estos malriĉa, malaltranga kaj dungata.

153) Li estos malsanema kaj ne havas amikon. Se li volus amikiĝi kun iu, kiu helpas lin, ĉi tiu neatendos lin.

154) Kiam li lernus medicinon kaj krucas malsanulon, tiam kontraŭe la malsano malboniĝos pli kaj pli. Aŭ la malsanulo havos alian malsanon kaj fine mortos.

155) Se li mem malsaniĝus, neniu kracus lin. Eĉ se li kuraciĝus per bona medikamento, lia malsano kontraŭe malboniĝos kaj li doloros.

156) Se iu ribelus, ŝtelus, forrabus aŭ minacus, poste la severaj punoj falus sur lin maljuste.

157) Tia kulpulo neniam povus vidi la Budhon, la Reĝon el Sanktuloj, kiu inter homamaso predikas kaj instruadas.

158) Tia kulpulo naskiĝus ĉiam en malfacila loko<sup>27</sup> kaj estus freneza, surda kaj pro malorda koro ne aŭdos longe Darmon.

159) Dum nekalkuleblaj kalpoj similaj al la sabloj de Ganga li estus multfoje surda kaj mutulo denaska. En ĉiuj vivoj liaj sentumoj ne estus kompletaj.

160) Li estus en infero tiel ofte kiel oni staras ĉiutage en sia ĝardeno. Kiam li estus en iu alia malbona vojo, tiam li sentus ĉi tiun lokon kvazaŭ sia propran domon.

161) Kamelo, azeno, aglo aŭ hundo, ĉi tiuj estus rezultoj, kiujn li gajnis pro siaj pasintaj agoj. Pro riproĉo al ĉi sutro oni gajnus tiajn punojn.

---

<sup>27</sup> malfacila loko, 難處. La loko, kie oni neniam povas vidi Budhon aŭ aŭdi veron, t.e. tri malbonaj vojoj (infero, malsatanta demono, bestoj), ekstrema loko, longviva-ĉielo, blindulo, surdulo, mutulo, spertiĝanto je la kono pri nur mondaj aferoj, kaj vivantoj antaŭ la Budho aŭ post la Budho.

162) Se li naskiĝus kiel homo, li estus surda, blinda, muta. Ankaŭ malriĉo kaj kaĉuko ĉiam sekvus lin.

163) Li vestiĝos per tielaj malsanoj nomataj vezikato, gonoreo, skabio, sifiliso kaj ŝvelaĵo.

164) Li loĝus en malbonodoro kaj la korpo estus malpura. Li estus alligata memon kaj kolero pliiĝus al li.

165) Ĉar li estus forte volupta, li ĉiam seksatentus kontraŭ birdo aŭ besto. Pro riproĉo al tiu ĉi sutro oni akirus tiajn punojn.

166) Mi diras al Ŝariputro. Eĉ se en tuta kalpo mi predikus pri la punoj, kiujn iu akirus pro riproĉo al la sutro, mi ne povas paroli ĉion.

167) 168) Pro la supredirita kaŭzo mi precipe diras. Ne parolu pri tiu ĉi sutro inter malsaĝaj homoj. Se jen estus la homo, kiu havas akrajn sentumojn, klaran scion, bonan memoron kaj estas dezireganta aŭdi la vojon de Budho, parolu al li la sutron.

169) Se jen estus la homo, kiu antaŭe vidis centmilionajn Budhojn kaj plantis radikojn de bonoj kaj havas firman kredon, parolu al li la sutron.

170) Se jen estus la homo, kiu ĉiam klopodas kun bonfarplena koro kaj neniam domaĝas sian vivon por bonagado, parolu al li la sutron.

171) Se jen estus la homo, kiu estas humileca, ne havas perfidan intencon kaj loĝas sole en arbaro, parolu al li la sutron.

172) [mankas teksto al la originala traduko fare de Asano]

173) Se jen estus Budha knabo, kies ago estas pura kvazaŭ gemo pura kaj neta kaj kiu deziras aŭdi Mahajanan sutron, parolu al li la sutron.

174) Se jen estus la homo, kiu estas senkolera, sincera kaj ĝentila, ĉiam kompategas ĉiujn kaj adoras ĉiujn budhojn, parolu al li la sutron.

175) Se jen estus Budha knabo, kiu kun pura koro predikas Darmon senbare per diversaj paraboloj, kaŭzoj kaj esprimoj en la amaso, parolu al li la sutron.

176) Se jen estus. bikŝuo, kiu serĉas kvardirekte la Darmon por ĉiuj scioj, kunpremante siajn manojn tenas ĝin en sia koro, sed neniam tenas eĉ unu verson el aliaj sutroj, parolu al li la sutron.

177) 178) Se jen estas homo, kiu deziregas la sutron kvazaŭ oni deziras la ŝariron de la Budho, gajninte adoras ĝin, ne volas alian sutron kaj neniam pripensas pri la libroj de herezo, parolu al li la sutron.

179) Mi diras al Ŝariputro, "Eĉ se dum tuta kalpo mi predikus pri la figuroj, kiujn posedas fakte la serĉantoj de la Budha-vojo, mi ne povas paroli ĉion. Tiaj homoj bone komprenas la Darmon. Tial parolu al ili Saddharma-Pundarika-sutron."